

Bulgara **ESPERANTISTO**



1967

TRA LA GAZETARO

En ĵ. „Dunavska Pravda“ — Ruse (de 11. IV. 1967) — anonco en la kroniko, ke la Modela Legejo „Zora“ en Ruse, la Distrikta Komitato de BEA, la Distrikta kaj Urba Komitatoj por defendo de la Paco aranĝas en la salono de la Legejo solenan rememorigan vesperon dediĉitan al Zamenhof okaze de 50-jara datreveno de lia morto. Prelegon pri la internacia turismo kaj Esperanto faros D-ro Zahari Boĉev.

En la sama ĵurnalo (de 12. IV. 1967) — informo ke okazis la solena rememoriga vespero dediĉita al Zamenhof.

En ĵ. „Narodno Delo“ — Varna (de 3. VI. 1967) — artikolo de Zora Ml. Hans „Unu utila libro“, en kiu la aŭtorino recenzas la Lernolibron de Esperanto de Georgi Ĥr. Dimov.

En ĵ. „Večerni Novini“ (de 19. VI. 1967) — informo „La lernojaro por la malgrandaj esperantistoj finiĝis“, en kiu oni rakontas pri la solena fermo de la kurso de Jordanka Kozaĉeva en la sofia lernejo „Kiril kaj Metodij“.

En la sama ĵurnalo (de 21. VI. 1967) — en la kroniko anonco pri la tuturba E-kunveno kun oratoroj W. Gilbert, T. Balda, Prof. S. Podkaminer kaj H. Fuks, elstaraj agantoj de MEM.

En ĵ. „Oteĉestven Front“ (de 21. VI. 1967) — en la kroniko anonco pri la sama kunveno kun oratoroj elstaraj agantoj de MEM.

En la sama ĵurnalo (de 4. VIII. 1967) — en la rubriko „Sciigoj de la lando“ — informo pri la E-kursoj en Pamporovo.

En ĵ. „Rabotniĉesko Delo“ (de 25. VII. 1967) — en la rubriko „Koncize“ — informo ke en Bela Palanka, Jugoslavio, komenciĝis la Unua E-Balkaniado, en kiu partoprenas reprezentantoj de E-societoj el Jugoslavio, Bulgario, Ĉeĥoslovakio kaj Hungario.

En ĵ. „Oteĉestven Zov“ — Vraca (de 27. VI. 1967) — informo pri la vizito de la elstaraj agantoj de MEM en Vraca.

En ĵ. „Dimitrovgradska Pravda“ (de 13. VII. 1967) — artikolo de Ĵeko Zaprjanov „Lernantoj-esperantistoj el Dimitrovgrad en Hungario“ kun foto de la ĥoro. La aŭtoro rakontas pri la interesa vizito en daŭro de 16 tagoj de 26 bulgaraj lernantoj en urbo Sirmabeŝenujo kaj aliaj loĝlokoj en Hungario dum junio 1967.

En ĵ. „Eĥo“ — Sofio (de 14. VII. 1967) — en la rubriko „Esperanta Mozaiko“ N. Nikolov donas interesajn informojn el la vivo de la turistoj-esperantistoj.

En ĵ. „Iskârska Komuna“ — Mezdra (de 25. VII. 1967) — artikolo de Veselin Dimitrov „Elstaraj esperantistoj, batalantoj por paco, gastoj al Mezdra“. La aŭtoro rakontas pri la vizito de tiu urbo fare de elstaraj esperantistoj — aktivaj agantoj de MEM. La artikolo estas akompanata de foto kun la gastoj.

En la semajna ĵurnalo de BTA — „Fotografioj kaj karikaturaj“ № 24/1967 — informo „Lingvo de la espero — 50 jaroj de la morto de Zamenhof“ kun portreto de Zamenhof kaj foto prezentanta kovrilpaĝon de la unua eldono de la broŝuro de Zamenhof. La aŭtoro rakontas pri Zamenhof kaj lia verko.

En ĵ. „Pogled“ (de 7. VIII. 1967) — artikolo de Petr Hlebarov „El la pasinteco de la aviadilkonstruado en Kazanlâk — la unuaj aviadiloj produktitaj en Bulgario“, en kiu la aŭtoro interalie rakontas la interesan korespondadon inter la nederlanda esperantisto Alberto Huijzinga kaj bulgara esperantisto Ivan Zahariev konekse kun la komenco de la aviadila industrio en Bulgario.

En ĵ. „Zvezda“ — Kjustendil (de 7. VI. 1967) — informo de C. Murgin „Unua Distrikta Konferenco de la esperantistoj“, kiu okazis en vilaĝo Ŝatrovo, akompanata kun foto.

NOVA POŝTMARKO DE U. N. POR INTERNACIA JARO DE TURISMO

La 19-an de junio la Poŝta Administrejo de Unuiĝintaj Nacioj eldonis novan poŝtmarkon okaze de la „Internacia Jaro de Turismo“. La ĉefa celo de la Internacia Jaro de Turismo estas: instigi al vojaĝado kaj konsciigi la registarojn kaj aliajn instancojn pri la devo montri gastamon al la vizitantoj. La nova marko montras la blazonon de U. N. kun alligitaj kofroetikedoj. Ĝi aperis en la valoro de 5 cendoj (bruna, brunflava, verda kaj ruĝa) kaj 15 cendo (brunflava, blua, verda kaj ruĝa). (Laŭ Unesco Features kaj Informa Servo de UEA).



LA INFLUO DE LA GRANDA OKTOBRA SOCIALISMA REVOLUCIO

Proksimiĝas la hela 50-jara datreveno de la plej granda revolucio en la historio de la homaro. La antikva sentenco tekstas, ke „La lumo venas de la Oriento“. Pro ekesto de eksterordinare gravaj cirkonstancoj la lumo, kiu lumigas la estontecon de la tuta homaro, venis de la slava Oriento — la estinta rusa cara imperio — „malliberejo de la popoloj“, timigilo por la progreso en la mondo, aliancano de ĉiuj reakciaj fortoj sur la tero.

La imperiistaj rabistoj de la du batalantaj tendaroj dum la tempo de la Unua Mondmilito unuigis siajn fortojn kaj kruele ĵetis sin al la juna Soveta Respubliko. Sed la rusaj laboristoj kaj kamparanoj, sub la saĝa gvidado de la Bolŝevista Partio kaj la genia Lenin, forpuŝis la grandegajn fortojn de Britlando, Francio, Usono, Germanio, Japanio kaj ankoraŭ deko da kapitalistaj ŝtatoj. La Revolucio estis savita post trijara peniga, konsumiga, sed plenigita per neimagebla amasa heroismo milito kontraŭ la invadintoj.

Jam kvindek jarojn en la plej nova historio de la homaro brilas la hela ruĝa stelo de Kremlo kaj ĵetas siajn savigajn radiojn sur la tuta terglobo. Vere la imperiistoj de ĉiuj landoj persiste ĝis saĝoperdo ne volas rezignacii pri la fakto, ke en la mondo estas ruĝa Moskvo. La faŝistaj bandoj de Hitler kun la beno de la tuta monda reakcio ekbruligis la incendion de la Dua Mondmilito kaj celis per sia tuta agreso neniigi Sovetunion, sed tamen malgraŭ la kruelega bato la unua en la mondo ŝtato de la laboristoj kaj kamparanoj eltenis kaj gajnis mond-historian venkon rilate la faŝistajn agresantojn kaj estiĝis unuagrada faktoro en la vivo de la tuta homaro.

En daŭro de la forpasintaj 50 jaroj Sovetunio elkreskis kiel plej potenca laŭ sia defenda forto lando. Ĝia politiko de paco kaj amikeco inter la popoloj, ĝiaj noblaj klopodoj por paca kunekzistado de ŝtatoj kun mal-sama sociordo, ĝiaj grandegaj sociaj transformiĝoj plenumitaj de la soveta sociordo en intereso de la plej vastaj popolamasoj, la grandegaj atingajoj de la soveta scienco kaj tekniko, sturmintaj unuaj en la historio de la homaro la vastegan Kosmon, la disfloriĝo de la naciaj laŭ formo kaj socialismaj laŭ enhavo kulturoj de ĉiuj popoloj kaj nacioj de la Soveta Ŝtato — ĉio ĉi kaj ankoraŭ multaj aliaj atingajoj de la soveta aŭtoritato levis la prestiĝon de Sovetunio en ĉiuj anguloj de nia planedo. Rajte la pacamaj ŝtatoj kaj la progresemaj kaj demokratiaj fortoj en la tuta mondo, ĉiuj minacataj de la agreso de l' imperiistoj popoloj, ĉiuj politikaj agantoj, al kiuj estas kara la nacia sendependeco kaj la sendependa ekonomia kaj kultura

disvolviĝo de iliaj landoj, rigardas kun espero kaj fido al la granda lando de la venkinta socialismo kaj de la kreiganta komunismo.

La helpo de la sovetaj popoloj estas helpo frata, neprofitema sen kiaj ajn politikaj kondiĉoj kaj ĉantaĝoj, helpo elkora flanke de popolo, kiu per multa laboro kaj multa ŝvito savis sin de la imperiista jugo kaj dividis de sia panpeco por helpi ankaŭ al aliaj batalantaj popoloj akiri la eblecon konservi sian liberon, sian nacian kaj ekonomian sendependecon. Kaj kvankam du kvinonoj de tiu rimarkinda duonjarcento forpasis por repuŝi la multnombrajn agresantojn kaj invadantojn, por likvidi la pezajn postsekvajn de la malvenkoj de du imperiistaj militoj, kaj unu altrudita de la internacia reakcio trijara civitana milito, Sovetunio brave batalis por disvolvi siajn produktadfortojn ĝis tia nivelo, ke dum la sekvantaj kelkaj jarkvinoj superis eĉ la plej disvolviĝint n kapitalistan landon — Usonon. Ne estas dubinde, ke se oni konservos la pacon en la mondo la sovetaj homoj plenumos ankaŭ tiun taskon de mondhistoria signifo.

La eksterordinaraj sukcesoj de Sovetunio kaj de la monda socialisma sistemo ĉiam pli kaj pli allogas la simpatiojn de la homoj kun bona volo sendiference de iliaj politikaj, religiaj, filozofiaj k. a. konceptoj, sendiference de nacia kaj rasa aparteneco. La agresa milito, kiun gvidas la usona imperiismo kontraŭ la heroa vjetnama popolo, la subteno de Usono, Britlando kaj Germana Federacia Respubliko al la israela agreso kontraŭ la progresemaj fortoj kaj la vivintereso de la arabaj ŝtatoj, senĉesa organizado de reakciaj puĉoj en Afriko, Greklando, Dominika Respubliko kaj multaj aliaj landoj kovras per malhonoro la imperiistojn kaj aliajn satelitojn kaj pagitajn marionetojn. Kaj ne estas mirinde ke malgraŭ ĉiuj monstraĵ streboj de la ideologia diversio kontraŭ Sovetunio kaj la aliaj socialismaj ŝtatoj, la fortoj de la socialismo ne malgrandiĝas, sed ĉiam plimultiĝas, ĝiaj noblaj ideoj trovas ĉiam pli larĝan akcepton en ĉiuj kontinentoj.

La bulgara popolo estas dankema el la profundoj de siaj animo kaj koro al Sovetunio, kiu donis al ĝi decidigan helpon en la batalo por likvido de la monarka-faŝisma diktaturo kaj germana faŝista okupado, kiel ankaŭ en la konstruado de la politika, ekonomia kaj sociala forto de Nova Bulgario. La malnova multjarcenta amikeco inter la rusa kaj bulgara popolo superkreskis en nerompebla bulgara-soveta amikeco, en fundamenta ŝtono, super kiu la bulgara popolo konstruas sian nacian sendependecon kaj suverenecon.

La bulgaraj esperantistoj estas inspiritaj de la noblaj ideoj de la bulgara-soveta amikeco. Jam plurajn jarojn antaŭ la liberiĝo de nia lando ili trovis manieron kaj formojn subteni intimajn kamaradecajn rilatojn kun siaj sovetiaj korespondantoj kaj ne nur ekscii senpere de ili la veron pri la unua socialisma lando, sed ankaŭ disvastigi tiun veron inter la laboruloj en Bulgario. La kontribuo de la bulgaraj esperantistoj por plifirmigo de la bulgara-soveta amikeco dum la malhelaj jaroj de la monarka-faŝisma diktaturo, la viktimoj, kiujn donis la esperantista movado ĉe ni en la batalo kontraŭ la fortoj de la reakcio kaj faŝismo restos gravuritaj por eterna tempo en la revoluciaj analoj de nia popolo.

Dum la jaroj post la Naŭa de Septembro 1944, kiam la popolamasoj sub la gvidado de Bulgara Komunista Partio konstruis la socialismon ĉe ni kaj preparis la transiron al la konstruado de la senklasa komunisma socio, la amikeco de la bulgaraj kaj sovetiaj esperantistoj transiris al pli supera



etapo. Estis kreitaj eblecoj ne nur por korespondado, sed ankaŭ por senperaj renkontiĝoj kaj personaj kontaktoj. La organizitaj bulgaraj esperantistoj per siaj societoj en urboj kaj vilaĝoj aktive partoprenas en la konstruado de la nova vivo konsciante, ke nia plej granda amiko kaj frato en tiu epopea batalo por feliĉa vivo de la tuta bulgara popolo, en la batalo por konservo de la monda paco — tio estas ĉiam la potenca kaj nevenkebla Sovetunio.

Pro tio kun pura ĝojo, kun plej sinceraj sentoj de entuziasmo kaj adoro je la memoro de la sovetiaj kaj bulgaraj herooj, fordonintaj sian vivon por la venko de la socialismo, fieraj, ke ni apartenas al la mondo de la socialismo, al la falango de la batalantoj por paco kaj feliĉo de la popoloj, ni — la bulgaraj esperantistoj — renkontas la grandan 50-jaran datrevenon de la Oktobra Socialisma Revolucio.

Plej bone esprimis tiujn niajn sentojn al la heroismo de la sovetaj homoj la senmorta proletara poeto Ĥristo Smirnenski en siaj ardantaj versoj:

*„Kaj via mano, fratoj,
firmiĝu en la viv'!
Ĉar per la lum' skarlata
flamigis stelon vi.*

*Kaj stelon ĉi admiros
pro ĝia vok' inspira
la nun dormantaj viroj,
por pano kaj liber'.” (1920 j.)*

Estu eterna la granda faro de la Oktobra Socialisma Revolucio!

Vivu, kresku kaj disvolviĝu la vivokrea bulgara-soveta amikeco — „aero kaj suno por la bulgara popolo”, kiel ĝin plej ĝuste kaj saĝe difinis nia neforgesebla gvidinto, instruinto kaj fondinto de nova socialisma Bulgario Georgi Dimitrov!

MARISTO DE LA KIRASSĪPO „POTEMKIN“

de K. Kolev

Malgranda dometo blankiĝas supre sur la bordo de la malgranda golfo, kie la deklivoj de Balkan-montaro malaperas en la maro ĉirkaŭ la vilaĝoj Obzor kaj Bjala. Iu maljunulo travivinta la pezan ŝarĝon de multaj jaroj, alpaŝas malrapide ĉirkaŭ la kortbariloj de siaj najbaroj kaj supreniras al la maro. La vilaĝanoj de Bjala kutimiĝis rigardi lin sur la senhoma bordo — homo kiu ĉiam atendas aŭ adiaŭas iun. Ĉu ĝojo, ĉu malĝojo lin logas al surkreskinta per arbustoj eroziita loko, kie nenio alia aŭdiĝas de la vivo, krom la elemento elŝprucinta el la profundaĵoj. Nur la flugo de la mevoj rememorigas pri la vivo, kiun la tero portas sur siaj lacigitaj ŝultroj.

La tera fortikaĵo subfosita de la ondoj kurbiĝas kaj perdiĝas ie malproksime kaj ĉio kunmiksiĝas en la senlima blueco, kolektinta la kolorojn de la mara vastaĵo kaj de la ĉielo. Ĉis kie vidas tiuj okuloj premitaj de la sulkoj? Ĉu tio ne estas la okuloj de tiu dudek du jara maristo el kirassipo „Potemkin“ Jakov Petroviĉ Tereŝĉenko . . . Ĉu vi rakontas al ni, avo Jakov, pri la tagoj estiĝintaj kiel legendo?

. . . Kaj ekiras la ŝipoj de la rememoroj tra la mara vasteco. La brako de la maljunulo tratranĉas la ondojn kaj liaj fingroj montras urbojn kiujn neniu vidas de tiu bordo.

— Rekte al la oriento troviĝas Se-

bastopolo kaj la golfo de Tandrova. Kia haveno estas tie! Kaj maldekstre for de ĝi estas Odeso.

La kontraŭstarantaj bordoj estas kaŝitaj de la rigardo, sed la memoro de la maljuna maristo altigas ilin al la horizonto kaj ĉiumatene ilin karesas per tiu maldelikata mano. Lia kareso verŝajne estas el la plej teneraj, kiajn konas la homo, ĉar ĉiu nervo radias amon. Tiu brako nin ekkondukas tra la ŝaroj, lia belsona rusa parolo revivigas eventojn kaj figurejn. Nia imago vidas iun blankan ŝipon, kiu naĝas impete al ni, kiel en la fabeloj, etendinta mastojn kaj kanonojn, ĉirkaŭnajtita per heleblua ŝtalo. „Potemkin“! Unu vico da maristoj staras eterne sur ĝia ferdeko kaj ni kvazaŭ aŭskultas iliajn voĉojn, la voĉon de la historio mem.

La 26-an de junio 1905. La tago kiu estiĝas la komenco de unu revolucio. La fajrero de la matrosa ribelo ekflamas, kiam la junuloj ĵetas en la maron la tasojn kun putriĝinta manĝaĵo. Kolonelo Golikov anhelinta forlasas la kapitanan kajuton. La signalisto muzikas kolektiĝon. La ferdeko pleniĝas de maristoj.

Kiu kuraĝis permesi al si levi voĉon kaj inciti al protesto la maristojn?

Ekklakas kulasriglilo de karabeno. Leŭtenanto Gilerovski ekstaris kontraŭ la ŝipanaro kaj liaj fingroj tenas la ĉandekroĉilon. El la okuloj de la maristoj elŝprucas fulmoj. La aero tie ĉi ankaŭ estas ŝargita per eksplodaĵo. Neniam estis tiom silente sur la kirasŝipo. La sekundoj egaliĝas kun la eterneco.

Iu voĉo distranĉas la streĉecon:

— Al kiu vi pafos? Ni volas liberon kaj homan vivon . . .

Grigorij Vakulenĉuk levas manon kaj kiel birdo etendas flugilojn por ekflugi. La reĉo de tiu ĉi voĉo silentiĝis en la blua matrosa vico. Surdigis ĝin la pafotondrinta tra la tuta ŝipo. Gilerovski denove ŝargas la karabenon: akre eksonas nova kuglo. La maristo

falas sur la dikaj ŝipaj ŝnuroj kaj ili ĉirkaŭprenas lin kiel teneraj brakoj. La belaj strioj de la marista flanelo estiĝas skarlataj kaj la gutoj de sango sur lia brusto kolektas ĉiujn radiojn de la suno.

— Ĉiu, kiu ekmoviĝos de sur sia loko estos mortpafita! — krias iu oficiro.

La aliaj sin ĵetas al la maristoj kun eltiritaj pistoloj.

— Gardantaro, ĉirkaŭ la ferdekon, estu pretaj por pafado . . .

La marista vico fleksiĝis kaj ĉirkaŭis la mortintan mariston kaj iliaj bluaj ĉemizoj eksimilis je krono el skilo.

Kiam elflugis antaŭ la kanonfaŭko la maristo Afanasij Matjuŝenko.

— Kamaradoj, prenu la armilojn! Sufiĉas jam al ni la suferoj . . . Plu ni ne povas toleri!

La vivo estas kolektiĝinta nur en unu momento. En tiu momento, kiam vi devas elekti — paŝon antaŭen, kiu vin proksimigas al la morto, aŭ vi devas cedi por ke vi vivu. La homoj estas klinintaj la kapojn kiel mortintoj. Tiom estas senbrue, ke la maristoj sentas la batojn de sia maltrankvila koro. La koro, kiu solvas la sortodecidajn momentojn de la homo. La sekundoj estas malmultaj por aŭdi ankaŭ la voĉon de la racio. Sed la koro havas la plej grandan rajton impulsi unu paŝon, ĉar en ĝi estas kolektita la vivo.

Kia estas via vorto, Jakov Petroviĉ, dudek du jara maristo, ĵurinta servi al lia imperiestra moŝto? Maristo, vi, kiu sub morta kondamno estas devigata defendi la ŝtatan potencon kaj vian gvidantaron kontraŭ la ribeloj. Kien vi transaltos en tiu momento? Neniu povas resti en la mezo inter la faligita kamarado kaj tiuj kiuj tenas la armilojn. En ĉiu batalo estas du frontoj — unu kontraŭ alia. En la animo de la maristo sonas multaj voĉoj. Denove tondras kiel vivaj la vortoj de Grigorij: „Al kiu vi pafos? Ni volas liberon kaj homan vivon!“ Tiuj vortoj altiĝas super ĉiuj



voĉoj ĝis kiam restas nur ili kaj la skarlataj koloroj antaŭ la okuloj. Kaj vi ekpaŝas antaŭen, maristo, vi iras al la morto pro la vivo, pro la honesta, vera vivo de la homo. Ĉu havas ian signifon la fakto, ke ĝi finiĝos je la 22-a jaro, aŭ vi ĝisvivos ĝis profunda maljuneco.

La manoj de Jakov ŝiras argentplektitajn epoletojn de la oficiroj. Liaj manoj estas plenaj de venĝo. Kiel al ĉiuj, kiuj de hodiaŭ matrikuliĝis en la regimentoj de la revolucio.

La oficiroj sin ĵetas en iliaj kruroj kaj kisas ilin. „Vi indulgu nian vivon! Estu homoj! Kompaton, sinjoroj!“

La vivon?

Kiu revenigos en nian vicon Grigorij?

La revolucio komenciĝis! De hodiaŭ „Potemkin“ estos la signalo de tiu batalo tra tuta Rusio. La signalisto muzikas kolektiĝon. La maristoj levas surmane la ankoraŭ varman korpon de Grigorij Vakulenĉuk . . . En la okuloj ne estas larmoj. Ili ĝin portas kiel standardon. La malnova estas ĵetita malantaŭ la ferdeko. Sur la ŝipestra ponteto, bruligita pro la fumo de la pafado, staras la maristo Matjuŝenko. „Potemkin“ levas ankron.

Antaŭ la ribelanta ŝipo estas Odeso. Matjuŝenko kaj la signalisto estas sur la pruo. La flagetoj kruciĝas, leviĝas, malleviĝas — ili transdonas la ultimaton de „Potemkin“: „Trupo de la kirassipo surbordiĝos por enterigi la pereintan por la revolucio mariston Grigorij Vakulenĉuk. Se la ŝtatpotencoj ektuŝos iun, la urbo estos detruita de niaj kanonoj. Maristo Matjuŝenko“.

Kaj ekiras la funebra kaj fiera procesio al la tombejo de Kulikovo.

La maro kaj tero estiĝas malamikoj. „Potemkin“ ekiras tra la akva vasteco kiel naĝanta insulo, kiel libera teritorio de la revolucio. Kiu estos tiu sensaĝa ekipo, ribeliĝinta sola kontraŭ tuta imperio? La militaj tribunaloj enmatrikulas la nomojn de la maristoj en la

vicoj de kondamnitaj je morto. Sed kio estas la morto antaŭ la momentoj da libero?

Jakov Petroviĉ estas en la maŝina fako. Sur lia vizaĝo oni vidas maltrankvilecon.

— Matjuŝenko, nia kapitano . . . Baldaŭ la karboj finiĝos kaj haltos la kirassipo.

La kapitano en marista bluzo rigardas lin kaj nenion elparolas. Parolas nur liaj okuloj:

„Mia sangfrato! Ni ekiris al revolucio kaj niaj kapoj estas jam oferitaj al morto. Verŝajne en ia fremda haveno ni ricevos karbojn, brulaĵon kaj nutraĵon!“

Jakov rigardas al la horizonto. La maro fumas. La maro fajras! Al la maristoj sin ĵetas atake ŝtormo de torped-ŝipoj kaj krosŝipoj.

Matjuŝenko ekstaras sur la ŝipestra ponteto. Neniu kapitano projektis tiel certe batalan irplanon. Artileriistoj, sur viaj lokoj! . . . Ĉiu kanono je alcelo! Plene antaŭen!

— „Jes“, plene antaŭen! . . .

La eskadrilo estas proksimiĝinta al la kirassipo. Kanonoj kontraŭ kanonoj estas levintaj siajn faŭkojn.

— Vi estas ĉirkaŭitaj! Kapituluacu aŭ ni vin ekstermos ĝis la lasta! — ripetas de la komandestra ŝipo.

Matjuŝenko eliras antaŭen.

— Maristoj! Nia ekipo ne havas blankan standardon. Kaj tian ĝi neniam havos! Levu sur la masto la ruĝan flagon! Ni ne estas kulpaj, por ke ni kapitulacu. Ni defendas nian vivon kaj nian matrosan honoron.

La kirassipo restinta sen karboj kaj nutraĵoj, estis plena je obusoj kaj decidis batali kiel neniu alia ŝipanaro ĝis nun. La eskadro retiriĝas. „Potemkin“ ekiras laŭ sia vojplano tra Nigra Maro. Kie ĝi haltos, aŭ la tempestoj estos la lasta ĝia azilo?

La ŝipo proksimiĝas al la golfo de Varna. Signalistoj de bulgaraj ŝipoj

akceptas la peton de „Potemkin“ al bordiĝi en la haveno. La respondo malfruas. Kaj la urbo ĉirkaŭita de verdaĵo allogas la maristojn. Dekstre oni vidas la caran kastelon . . . De tie lia cara moŝto Ferdinand rifuzas akcepti en bulgara haveno „La Ruĝan kirassĥipon“.

Iu kuras al Matjuŝenko.

— Ni sendu kelkajn kanonsalvojn al la kastelo, ha Matjuŝenko? Kiu ne volas nin? Ĉu ja la bulgaroj rifuzos al ni akcepti siajn fratojn! La caro ĉie estas unu kaj sama!

Matjuŝenko kuntiris brovojn. Per unu pafo vi ne detruos la malnovan mondon. Ili trapasis apud tiuj bordoj, kie nun staras Jakov, kaj haltis proksime apud Kjustenĝa.

La maljuna maristo interrompas sian rakonton . . . Kaj ni atendas lin enprofundiĝi en la rememoroj, vidi tiun spuron de la kirassĥipo „Potemkin“ kvazaŭ ne surverŝita de la ondoj. Eble li revenos laŭ la vojoj de Dobruĝa, por atingi la vilaĝeton Bjala, situanta apud la mara golfo. Tiu artileriano de la kirassĥipo estis prava — „La bulgaro ne rifuzos akcepti sian rusan fraton“. Li akceptos kaj varmigos lin en sia ĉirkaŭpreno. Kaj ekiris Jakov tra la vilaĝoj — jen estas draŝmaŝinisto, jen laboristo en muelejo.

En la malgranda ĉambreto de lia domo por „panjo“ Rusio rememorigas al li iu malnova rusa samovaro kaj kelkaj portretoj de maristoj el „Potemkin“ — de Vakulenĉuk, kun alta frunto kaj aglaj okuloj, de Matjuŝenko — ilia kapitano. Por tuta vivo sufiĉas kaj donas forton, tiu deko da tagoj, kiam ili estas travivitaj per la flamoj de io

granda kaj neripetebla.

Multaj jaroj disigas la epopean dramon de nia tempo. Kion scias pri ĝi la infanoj de la vilaĝo, kiuj kuras al li hodiaŭ, kiuj bulgarigis lian nomon:

— Avo Janko, nia seruro difektiĝis.

Kaj liaj manoj vigle prenas la mar-teleton kaj la ŝraŭbturnilon, ĉar tiuj karaj okuletoj atendas lin, tiom mildaj ke vi ne povas rifuzi eĉ kiam estas venintaj gastoj al vi de malproksime. Li estas ĉe siaj proksimuloj. Kie estas al li pli ameme? En la juneco forpelita de sia patrolando, li dividas sian koron inter du landoj kaj egale ilin amas. Eĉ kiam li dividas la amon, ĝi ne malfortiĝas, se profundaj kaj puraj estas ĝiaj fontoj.

Avo Jakov ne povas sin deŝiri de la maro. Ĝi donas al li vivon, per la venanta de la rusa lando humida bloveto, kun la rememoroj pri tiu belulo-kirassĥipo travaginta la Nigran Maron, kaj kun la homoj, alinomintaj lin je avo Janko kaj amintaj lin kvazaŭ li naskiĝis en tiuj lokoj. Ĉu ne estas la amo de tiuj homoj tiu forto, kiu donas vivon al ni ĉiuj!

Mia mano perdiĝas en la ega manplato de la maljuna maristo.

— Estu viva kaj sana, avo Jakov Tereŝĉenko!

— Ni estos fortaj kiel la tero — tiel rdiris niaj samlandanoj de Stavropol— espondas li.

Kaj ankaŭ nun mi lin vidas: ekstarrinta antaŭ sia dometo, svinginta la manon, kvazaŭ li vere estas kunkreskinta kun la tero. Kiel ĉiuj homoj vivintaj honeste sur ĝia tera krusto.

Tradukis: *Stojan Kostadinov*



GLORON AL OKTOBRO

EL LA POEMO MOSKVO

de Hristo Smirnenski

Ho Moskvo, Moskvo!
Vi arde ree pulsas, ree flagras!
Vi ree estas koro flama,
kaj kun ridet' purpura gardostaras
ĉe l' frate kunpremitaj manoj.
Ĉar brilo via de aŭror'
la mondmallumon jam traboris,
ĉar vi kiel fratina kor',
la ĝojon helan kaj angoron
entenas de la tuta ter'!
Ho Moskvo, Moskvo! —
vi koro el fandita fer'!

Ho Moskvo, Moskvo!
Vi venkis ĉe l' granita pord'
la hordojn de la kontraŭulo;
kaj vibras via stel' rubena for
al ĉiu sklava terangulo,
la sklavo kie plugas en amaro,
kaj mortas sen pecet' da pan',
kaj kie tondre la proleta maro
ekbolis de la sanga flam'
de la milita fajr' kruela.
Ho Moskvo, Moskvo!
de novaj tempoj stelo hela!

1921 Tradukis: Asen Grigorov

PATRINO ATENDAS

de Hrima

Virino grizhara el domo eliras,
trapasas la korton kaj haltas kun miro.
Ĝendarm' ŝin avertas: „David, via filo,
revenos matene de longa ekzilo“ . . .

La koro patrina kun ĝojo jubilis
kaj flamo en ŝiaj okuloj ekbrilis;
preparis sin dece por idon renkonti
kaj arde ekvibris anim' ŝia forte . . .

Ŝi milde ekrevas ĉe l' sojlo el ŝtono,
krepusko vualas rapide la domon.
Subite la revojn forpelas motoro —
ĉerk-aŭto alkuras . . . Ne batu, ho koro!

Al David Sasonov*)

Elaŭto descendas ŝofor', policano,
demetas la ĉerkon kaj ambaŭ rikanas:
— Forstreku ĉi tiun laŭvice de l' listo,
konata jam kiel ruĝ-esperantisto.

Eltenis la panjo ĉe l' bildo terura,
nek veoj, nek larmoj pro l' tempo obskura
sed helpis ŝi al la taĉment' partizana
por venka batalo super la tiranoj . . .

En tiu batalo, rezista kaj glora,
inspiris nin verve la naska Partio
kaj venko epoka de l' Granda Oktobro,
l' espero kaj helpo de Sovet-Unio.

*) Pereinta en la kontraŭfaŝista batalo

EL LA POEMO SEPTEMBRO

de Geo Milev

— — —
Tra la pontoj ĉielaj
altegaj sen fin'
per ŝnuroj kaj ferstangoj
ni portos la belparadizon
malsupren

sur la ĉagrenan
plenplenan je sango
terglobon.

Ĉinĵ profetaĵoj de filozofoj, poetoj —
realiĝos!

Sen Dio! Sen mastroj!
Septembro estiĝos Maj'.
La homa viv'
estos senhalta suprenir'!
— Nur supren! Nur supren!
Edeno ekestos sur ter'! —
ekestos!

Tradukis: Hr. Gorov kaj
1924 David Sasonov



Israelaj militistoj forpelis la kavalirojn de la verda stelo, kiuj volis kongresi en Tel-Aviv . . . Rotterdam afable proponis siajn hotelojn, la imponan konstruaĵon „De Doelen“, kiu fariĝis nia kongresejo.

Rotterdam estas la dua urbo en Nederlando, sed samtempe la unua havenurbo de la mondo. La nombro de la marŝipoj, enhaveniĝintaj dum la pasinta jaro, superas 28,000. La nombro de la riverŝipoj, kiuj trafikis de Rotterdam al Rejno, Mozo kaj Skeldo, estis ĉirkaŭ kvaronmiliono.

Kvankam la urbo estas alirebla per ŝipoj, trajnoj kaj aviadiloj, ne ĉiuj aliĝintoj vizitis la ĉi-jaran kongresurbon.

La solenan inaŭguron ĉeestis ne pli ol 600 personoj, inter ili 30 kongresanoj kaj 50 gastoj el socialismaj landoj. Pro modesteco de la cifero, la atmosfero ne estis tiel solena, kiel pasintjare en Budapeŝto. La kongreson salutis nur tri reprezentantoj de registaroj. Feliĉe la nombro de reprezentantoj de Landaj Asocioj estis pli alta — salutis entute 27. Malgraŭ la modesteco de la 52-a, la festparolado de la prezidanto de UEA Prof. D-ro Ivo Lapenna estis inspira. Li faris apologion al la urbo-heroo, piedpremita kaj sanganta dum la milito pro la germanaj nazioj. En sia parolado li esprimis tutkoran dankon al LKK de Tel-Aviv kaj al la tuta israela esperantistaro pro la granda preparlaboro, kiun oni sukcese plenumis por organizi la kongreson. Li ankaŭ ne forgesis danki al la gvidaj organoj de UEA, precipe al la Centra Oficejo kaj al la multnombraj helpantoj en Rotterdam, kiuj en mallonga tempo de du monatoj organizis la kongreson kaj ebligis, ke ne estu rompita la serio de niaj universalaj kongresoj.

En la tago de la inaŭguro por la kongresanoj oni malfermis la pordegon de la Urbodomo, kie la vicurbestro bon-

venigis la kongresanojn, regalis kaj prezentis skizan historieton de la urbo. La urbodomo estis konstruata dum la jaroj 1914—1920 laŭ projektoj de profesoro Henri Evers. La urbodomo estas impresa per sia meblaro kaj murpentraĵoj. El la parolado de la vicurbestro ni eksciis ankaŭ, ke dum la deksesa jarcento Rotterdam havis 7,000 loĝantojn. En 1857 la nombro de la loĝantoj superis 100,000, en 1917 — 500,000. Nun la urbo havas ĉirkaŭ 730,000 loĝantojn, inter kiuj 16,000 estas havenlaboristoj kaj 21,000 komunumaj oficistoj.

Ĉiutage per luksaj aŭtobusoj kongresanoj ekskursis tra la urbo. Oni ĝuis la preĝejon S-ta Laŭrenco, kiu apartenas al la malmultaj historiaj monumentoj, kiuj postrestis en Rotterdam aŭ konatiĝis kun la konstanta konstruekspozicio en la koro de la urbo. Tie la turisto vidas, kiel post la terura bombado dum majo 1940 fare de hitleraj aviadiloj, la nederlandaj konstrueskupertizistoj evoluigis sian urbo-centron modernmaniere. Tamen ankaŭ la malnovaj stratoj, konstruitaj laŭ nederlanda arkitektura stilo, vekas la atenton de multaj kongresanoj. Ilin preferis tiuj, kiuj ne disponis pri guldenoj. Tamen promeni tra la stratoj de Rotterdam ne estas teda afero, ĉar la okuloj ĝuas daŭrojn, diantojn kaj multajn aliajn florojn. Bedaŭrinde nur ke la belegaj tulipoj, per kiuj sin gloras Nederlando, estis jam forflorintaj.

Kun pietismo oni povas pasigi longan tempon ĉe la statuo de la pola-franca skulptisto Zadkin, nomata „La detruita urbo“. Ĝi staras sur la placo „Plein 1940“ (Placo 1940) apud haveno Lenvhaven. Giganta homa figuro kun levitaj brakoj defendas sin de la falantaj bomboj . . . Kiam mi sidis sur benko proksime de la monumento estis suna posttagmezo. Aro da kolomboj tuŝis per flugiloj la levitajn al la ĉielo brakojn,



kvazaŭ karesis ilin. La kolomboj — simbolo de la paco, ŝajne volis diri per tio al la homoj: „Estu atentaj, ne permesu novan militon!“

Nun ni direktu nian atenton al la enhavo de la ĉefaj kongresaj programoj. Ili estis fiksitaj laŭ la bontrovo kaj postuloj de la kongresanoj, ĉiu el kiuj havis sian preferon por unu aŭ alia afero.

Mi ĉeestis la kunvenon de MEM. Kiu scias, ĉu vole aŭ nevole la aranĝintoj de la kongresprogramo anoncis ĝin kiel kunvenon de la administro de MEM, kio estis la kaŭzo, ke ĝin vizitis nemultaj pacamikoj. Tamen malgraŭ tio la aŭditorio konsistis el diversnaciaj pacamikoj. La ĉeestantoj, aŭdinte la jarraporton de la prezidanto de MEM k-do N. Aleksiev, unuanime akceptis deklaron, en kiu oni emfazas:

„ . . . ke la plej grava tasko de ĉiuj pacamaj homoj, pli speciale la tutmonda pacama esperantistaro, estas batali plej energie, uzante ĉiujn eblajn formojn kaj kunigante kun nesperantistaj pacmovadoj kaj organizaĵoj, sen diferenco de politikaj, religiaj, filozofiaj kaj aliaj konceptoj por plej baldaŭa ĉesigo de ĉiuj militoperacioj sur la tuta terglobo kaj restarigo de vera, neniam tuŝebla kaj neniam minacata tutmonda paco“.

Kiom ĉi deklaro diferencas de la vortoj de iuj gvidantoj de UEA, kiuj elokvente parolas pri homaj rajtoj, tamen tute ignoras la homajn rajtojn de vjetnama kaj arabaj popoloj, kiuj arde strebas al memstara eskzisto kaj socia progreso!

22 jaroj pasis depost tiu mateno je la 6-a de aŭgusto 1945 j., kiam usona aviadiŝo ĵetis atombombon sur Hiroŝima-n. Por rememori pri la 300,000 viktimoj la 6-an de aŭgusto sub la prezido de la fama japana poeto Ito Saburo okazis dua kunveno de MEM en ŝipo-hotelo „Jan Backx“.

La slogano, kiun oni legas en ĉiu eldonaĵo de Internacio de Militrezistantoj,

tekstas jene: „Milito estas krimo kontraŭ la homaro. Mi do firme decidis ne subteni iujn ajn militon kaj nepre luktas por forigi ĉiujn kaŭzojn de milito“.

Do mi scivole transpaŝis la sojlon de salono „Yagi“, kie la malnova esperantisto kaj militrezistanto Alf. Tucker prezidis la kunvenon. Ni aŭdis la prelegon de J. Abileah pri reciproka kunlaboro kaj interkono inter araboj kaj judoj (en kadroj de zionista reĝimo!), kaj la referaĵon de H. F. Bing pri la situacio en ĉeza Oriento. Estis strange aŭsulti en kunveno de militrezistantoj vortojn, kiuj fakte rekonas la konkeraĵojn de israelaj militistoj. En la deklaro, kiun proponis s-ro Bing, estis diversaj proponoj por „reguligo“ de la mezorientaj problemoj, sed nenia propono por retiro de israelaj trupoj el Jerusalemo, el Siria kaj Egipta teritorio.

Vere, stranga nekonsenkvenco! Nek la prezidanto de la kunveno, nek s-ro Bing kontraŭdiris al la agitparolo fare de israela kongresano, kiu pasie defendis la militiron kontraŭ arabaj ŝtatoj. Lia cinika parolado memorigis al mi la paroladojn de Hitler, kiuj ĉiun militon kontraŭ iu ajn nacio deklaris kiel sindefenda . . . Estis domaĝe aŭskulti sinjorinon Grattapaglia el Italio, kiu opinias, ke la israelaj militistoj donacas civilizecon al senkulturaj araboj.

Ĉu tiel oni forigas ĉiujn kaŭzojn de milito?

Multaj kongresanoj interesiĝis pri la kunveno de Labora Sekcio 1 „Esperanto en fako kaj profesioj“. Raportis estraro M. Jaumotte. Pri la praktika apliko de la internacia lingvo en medioj de fervojistoj raportis D-ro Bacskay el Budapeŝto. Laŭ li, fervojistaj esperantaj organizoj ekzistas en 18 landoj. Estas eldonitaj fakvortaroj kaj fervojaj terminarojen kelkaj landoj. Ulrich Lins parolis pri la rilatoj de TEJO kun diversaj junularaj organizaĵoj. S-ro J. H. Rousseau parolis pri Esperanto-ligo filatelista, kiu ne estas sufiĉe forta, sed helpas la

filatelistajn societojn en multaj landoj. Oni aŭdis mallongajn raportojn pri apliko de Esperanto en rondoj religiaj, en medicino, en scienco ktp.

Same grava por la estonto de nia lingvo estis la kunveno de Laborsekcio II: „Lerneja kaj eksterlerneja instruado de la internacia lingvo“, kiun prezidis estrarano J. Toczyski. Partoprenis instruistoj el 21 landoj. Post la raporto kaj diskutoj la geinstruistoj konstatis, ke dum la plej proksima jaro oni devas streĉi ĉiujn fortojn por daŭre plenumi jenajn tri urgajn kaj por la oficialigo de Esperanto-instruado en la lernejoj taskojn: 1) pligrandigi la nombron de la instruistoj konantaj Esperanton kaj 2) pere de seminarioj kaj perfektigaj kursoj plialtigi la lingvonon kaj instrukapablon ĉe la jam esperantigitaj instruistoj.

La Internacia Somera Universitato ankaŭ ĉi-foje havis eminentajn prelegantojn. Bulgara Esperanto-movado gloras sin per bonaj sciencistoj, sed neniu el ili prelegis pro financaj kaŭzoj. Ni ankaŭ disponas talentajn aktorojn, dancistojn kaj muzikistojn, tamen pro la samaj kaŭzoj neniu el ili vizitis la 52-an. Do Internacia Arta Teatro sub la gvido de S. Flego ne havis konkuranton. Mi ĉeestis la teatraĵon „Skatolo, kiu muzikas“ kaj „Leciono“ de Jonesko.

La varia vespero laŭ mi ne estis tre varia pro malgranda nombro de la partoprenantoj. En la unua parto nederlanda pianistino Toos Schoonman ludis muzikverkojn de Schubert kaj Chopin, s-ro Ramona van Dalsen ĝojigis nin per siaj kantoj. Post la paŭzo denove ludis kaj kantis la samaj personoj...

Tri bulgaroj partoprenis belartan konkurson, sed neniu el ili ricevis premion. En la oratora konkurso mi aŭskultis oratoraĵojn de f-ino J. Carlson, s-ro R. Groeneveld, s-ro Simonnet kaj S-rino Kehlet. Juĝkomisiono aljuĝis la

unuan premion al Simonnet, la duan al Kehlet.

La 7-a de aŭgusto estis dediĉita al tuttagaj ekskursoj. Mi preferas ŝipon por tia celo kaj jam antaŭ la 8-a horo atendis sur la kajo Willemsplein. Nin akceptis blanka ŝipo. 140 gekongresanoj salutis la verdan flagon, kun kiu la vento petolis sur la masto. Unue la gvidanto konatigis nin kun la havenkomplekso. Oni montris al ni „Botlek“ — moderna grenentrepreno. Surkajaj elevatoroj malŝargis marŝipon, sur kies tubo ruĝis serpo kaj martelo. La gvidanto direktis nian atenton al Euro-poort. Tiu ĉi nun konstruata haveno priservos cisternŝipojn de po 225,000 toneloj kaj eĉ pli.

La industrio en la ĉirkaŭaĵo de Rotterdam bezonas grandajn kvantojn da akvo. Tial la komunumo konstruis oriente de la urbo modernan entreprenon por trinkebla akvo. Ĝi produktas ĉiujare po 160 milionoj da kubaj metroj da trinkebla akvo, cetere nesufiĉe bona gusta laŭ mia juĝo kaj laŭ la juĝo de multaj kongresanoj, kiuj preferis akvon antaŭ la multekostaj citron-kaj orang-sukoj.

Ju pii orienten ni ŝipveturis, des pli nin ravis la pejzaĝo de la lando. Preĉipe la kastelo Loevenstein kaj ĝia ĉirkaŭaĵo havigis al ni neforgeseblan impreson. Ambaŭflanke de la rivero la polderoj (lokoj sub la marnivelo) ĉarmis nin per siaj verdaj herbejoj. Sur ambaŭ bordoj de Mozo, kie vidigis sablostrioj tendumis somerumantoj, kiuj mansvinge salutis nin...

Kaj jen venas la lasta kongrestago. La kongresanoj kolektiĝis en salono Zamenhof por la ferma kunsido. Oni raportis pri la decidoj de Komitato de UEA, pri la nova estraro de UEA. Fine la kongresanoj ekkantis „La Esperon“ kaj per tio finiĝis la 52-a.

Ĥr. Gorov

Internacia Konferenco pri Homaj Rajtoj okazos en Teherano en 1968 (Jaro de Homaj Rajtoj) sub aŭspicio de Unuiĝintaj Nacioj. Ĝia celo estas: konsideri la progresojn faritajn sur la kampo de Homaj Rajtoj dum la pasintaj 20 jaroj kaj pesi la efikecon de la metodoj aplikataj de Unuiĝintaj Nacioj en tiu sfero. (Laŭ Unesco Features kaj Informa Servo de UEA)



KIEL LABORAS DISTRIKTA KOMITATO EN PLOVDIV KONEKSE KUN LA KONKURADO

La komitato en speciala kunsido dum julio pridiskutis la demandon pri la konkurado. Oni komisias al membro de la komitato kiu respondecos pri la ĝustatempa plenumado de la taskoj, metitaj en la konkurado, pri ĝia bona sukceso kaj pri la regula informado de la atingitaj rezultoj. Oni ellaboris planon por laboro kaj difinis la indeksojn laŭ kiuj oni organizos la konkuradon. Oni difinis tri premiojn por tiuj, kiuj gajnos en la konkurado. La unua premio estas 25 lv., dua premio — 15 lv. kaj tria premio — 10 lv. Por ĉiuj societoj en la distrikto oni difinis kontrolajn ciferojn por pago de la kolektita membrokotizo por 1967 kaj 1968, kaj por la kolektitaj abonpagoj por „Bulgara Esperantisto“. Oni pridiskutis ankaŭ la problemon pri eblecoj por fondiĝo de novaj E-Societoj kaj por aktivigo de tiuj kiuj stagnas. Ĝis la fino

de la tria trimonato oni antaŭvidas renkontiĝojn kun la estraroj de la societoj en kiu oni pritraktos la demandon pri la konkurado.

Ĝis la 30-a de junio ni povas raporti ke ni faris jenon:

1. Ni restarigis la E-societon en vilaĝo Trud.

2. Ni fondis novajn E-societojn en urbo Hisar, de la poŝtistoj kaj de la blindaj esperantistoj en Plovdiv.

Detalajn informojn pri la kolektitaj abonantoj kaj membrokotizo ni sendos en la fino de la tria trimonato.

At. Krumov.

*

La jarkunvenon de Studenta E-societo „Studenta Impeto“ ĉeestis studentoj el ĉiuj superaj lernejoj, gejunuloj, estraroj de la Distrikta E-Komitato.

Jarraporton tralegis la prezidantino de SES „Studenta Impeto“ Fani Miĥajlova. Trimonatan projektoplanon legis la sekretario Nikolaj Bojaĝiev.

Okazis viglaj diskutoj, rekomendoj, proponoj k. a., plimultigo de la membraro, aperigo de monataj murgazetoj, partopreno en la festivaloj de BEJ, kursoj por studentoj k. m. a.

Oni elektis novan estraron: Prezidantino — Fani Miĥajlova, Sekretario — Nikolaj Bojaĝiev, membro — Stefan Pavlov.

Nik. Bojaĝiev

RENKONTIĜO POR INTERKONATIĜO KAJ PLI BONA AMIKECO

La bulgara-hungaran amikecon la lernantoj-esperantistoj de Dimitrovgrad subtenas per aktiva korespondado. Pli ol dek monatojn ili skribis belajn leterojn, interŝanĝis donacojn kaj bildkartojn de belegaj loĝlokoj.


Sed ekaperis la ideo por renkontiĝo kaj reciproka gastado. Tiun utilan ideon subtenis la Komitato por Arto kaj Kulturo kaj dum la dua duono de junio 20 lernantoj-esperantistoj kaj ses gvidantoj gastis al siaj konatuloj en Sirmabeŝenujo — Hungario.

„Kiel ni estos renkontitaj kaj kiel estos organizita nia restado“ — tio emociis ĉiujn, malgraŭ ke ni sciis pri la hungara gastameco. Sed tio, kion ni vidis estis granda surprizo por ni. En Sirmabeŝenujo ni estis renkontitaj kun neatendita soleneco.

26 bulgaroj—26 grandaj bukedoj de freŝaj floroj kaj multaj, multaj elkoraj ĉirkaŭprenoj, kisoj

de niaj leterkonatuloj, de iliaj gepatroj kaj de la bulgaro Stefan Bakalov, kiu jam 30 jarojn loĝas en Hungario, sed ne forgesis sian patrolandon. Je la renkontiĝo ĉeestis la partia sekretario, la prezidanto de la komunumo, la direktoro de la lernejo kaj aliaj aŭtoritatuloj. La konstruaĵo estis ornamita per bulgaraj, hungaraj kaj esperantaj standardoj kaj slogano en Esperanto „Bone venintaj, karaj bulgaraj gastoj!“ Ĉio parolis al ni pri la granda varmeco de la hungara popolo.

Post unutaga ripozo, ĉiu en la domo de sia konatulo, sekvis renkontiĝoj en la Kultura Domo, komunaj muzikliteraturaj programoj kaj ekskursoj al rimarkindaj lokoj. Malgraŭ ke estis malmultnombra la horo de la esperantistoj el Dimitrovgrad, sub la gvidado de la lernantino Rumjana Stojkova kaj la geinstruistoj Valeria Stojanova kaj Kiril Kostov prezentiĝis tre bone.



La junpionira ĥoro de Dimitrovgrad

Eksciinte pri la bela programo la esperantistoj de la distrikta urbo Miŝkolc ekdeziris renkontiĝi kun ni kaj aŭdi nian ĥoron. Kaj denove aplaŭdoj, ĉirkaŭprenoj, floroj, dancoj.

Neforgesebla restos nia renkontiĝo kun la esperantistoj kaj la gvidantoj de UK de la Komsomolo en urbo Kazinzbarcik, kun kiu Dimitrovgrad ĝemeliĝis.

Specialan laŭdon meritas la kursgvidantoj de E-grupo en Sirmabeŝenujo Maria Busaj kaj Barbara Olajoŝ, ĉar ili preparis tre belan programon por nia grupo. La vizito de la bela ripozejurbo Eger kun la grandaj fortikaj muroj, urbo Aktelek kun 22-kilometra groto, la ripozeja loĝloko Tapolca, Balaton kaj la belega hungara ĉefurbo Budapeŝto, kie ni estis renkontitaj de reprezentantoj de CK de HEA kaj fotoreportero, estis ĝoja kaj agrabla por ni ĉiuj.

Ni multe ekĝojis kiam radio Budapeŝto disaŭdigis longan informon por ni kaj salutis nin per kvar bulgaraj kantoj.

Tre belajn kaj korajn rememorojn amasigis niaj lernantoj kaj instruistoj dum la 16 tagoj travivitaj en frata Hungario.

Kaj jen, venis ankaŭ la tagoj por gastado de niaj hungaraj konatuloj en nia lando. Por ilin renkonti je la stacidomo de Sofia venis kun ni ankaŭ la sekretario de CK de BEA k-do Ivan Sarafov, kiu salutis ilin elkore. Post tio la gastoj trarigardis nian ĉefurbon.

Por renkonti la hungarajn gastojn je la stacidomo de Dimitrovgrad venis ne nur la lernantoj kaj iliaj gepatroj, sed ankaŭ multaj geurbanoj. La vagonaro ankoraŭ ne haltis kiam aŭdiĝis la infanaj krioj:

„Monika“, „Tereza“, „Ameriko“... Ĉiu serĉis sian amiketon. Post tio — bukedoj, ĉirkaŭprenoj, kisoj.

En Dimitrovgrad krom la renkontiĝoj, kiujn

havis kun la lokaj esperantistoj, la hungaraj gastoj, trarigardis la Kemian Kombinumon, Planetarion, la Parkon „Nikola J. Vapcarov“ kaj aliajn rimarkindaĵojn.

Multajn agrablajn horojn ili travivis en Plovdiv kaj la monaĥejo apud Baĉkovo. En Ĥaskovo la gastojn renkontis sur la placo la gvidantoj de la esperantistoj kaj de la reprezentantoj de DK de DKMS kaj grupo da pioniroj. La gastojn kore salutis la prezidanto de E-societo „Asen Zlatarov“ Nikola Pilev, post kio al ĉiuj oni disdonis bukedojn de freŝaj floroj. En la parko „Jamaĉa“ al la gastoj prezentis literatur-muzikan programon la junpioniroj kaj oni disdonis donacojn.

Ĉe tre granda soleneco pasis la renkontiĝo inter la esperantistoj de Dimitrovgrad kaj la gastoj, kiu okazis en restoracio „Hijata“. Inter la lernantoj kaj gepatroj, gastoj estis la prezidanto de Urba Popola Konsilantaro inĝ. Janko Ginev, la sekretario de la Urba Komitato de „Patrolanda Fronto“ Panĉo Kalinov, la estro de MVR Kolju Iliev, la gvidanto de la fako „Propagando kaj Agitado“ ĉe UK de BKP Miĥail Borisov, la ĉefredaktoro de Ĵurnalo „Dimitrovgradska Pravda“ Slavĉo Georgiev kaj aliaj aŭtoritatuloj.

Renkontita per fortaj aplaŭdoj nia E-ĥoro, sub la gvidado de Rumjana Stojkova prezentis bean programon. Post tio la ĥoro de la gastoj prezentis sin kun tre belaj kaj emociaj kantoj kaj versaĵoj.

En la salutparolado, kiun la Prezidanto de GNS Janko Ginev faris je la nomo de la Estraro de UK de BKP kaj Urba Konsilantaro, esprimis sian ĝojon pro la reciproka gastado kaj emfazis, ke ĝi plifortigos multe pli la kamaradecon inter niaj du popoloj.

Je la nomo de UK de DKMS la gastojn salutis la sekretario Kiril Georgiev, kaj de la esperantistoj — la prezidanto de la societo „Internacia Amikeco“ Vladi Vâlĉev. Al la hungaraj gastoj oni disdonis donacojn kun bondeziroj por agrabla travivado en nia lando.

La horoj, travivitaj en kamaradeca renkontiĝa vespermanĝo estis precipe ĝojigaj. Kune kun niaj lernantoj la hungaraj gastoj ludis „ĉardaŝo-n“, dancis kaj gajigis ĝis malfrue.

Neforgeseblaj restos ankaŭ la 12 tagoj pasigitaj de la hungaraj gastoj en la Junpionira Tendaro de la Urba Konsilantaro en Obzor. Kun kia ĝojo kaj ĝuo la malgrandaj



petoluloj, kune kun siaj amikoj el Bulgarioj dum la tuta tago sin subakvigis en la akvojn de la Nigra Maro, kuŝis sur la ora sablo. Kaj vespere en la horoj de la kontrolo, vicigitaj en sia VI taĉmento kun granda atento plenumis la indikojn de la taĉmenta gvidantino instruistino-esperantistino Valerija Stojanova. Eĉ unu fojon la taĉmenta prezidanto la lernantino-esperantistino Irina Zaprjanova ne raportis foreston aŭ malfruigon. En la maro kaj sur la sablo, en la ludoj kaj diversaj aliaj okupoj, ili servis ĉiam por ekzemplo. Pro tio ne unu fojon la estro de la tendaro k-do Spasov montris ilin por ekzemplo al la aliaj lernantoj.

Je la nomo de sia taĉmento la hungaraj

gastoj prezentis sin per tre bela programo en Esperanto, kiu tre plaĉis ankaŭ al la aliaj 150 lernantoj el Dimitrovgrad.

En la Junpionira Tendaro en Obzor la hungaroj kaj la lernantoj el Dimitrovgrad plifortigis ankoraŭ pli la amikecon inter la du frataj popoloj.

— Dum la tagoj de nia restado en Bulgario kaj plie en Dimitrovgrad kaj Obzor, ĉie ni trovis varman akcepton. Ni aparte multe ĝojas kaj je la nomo de la grupo eldiras nian koran dankon — deklaris la gvidantinoj de la grupo Maria Bosaj kaj Barbara Olajoŝ.

J. Zaprjanov

INTERNACIA E-TENDARO EN VILAĜO PAVEL BANJA

En la komenco de junio en la banloko Pavel-banja estis organizita Internacia Esperanto-Tendaro. En ĝi partoprenis 27 geesperantistoj el Pollando kaj 3 el Ĉeĥoslovakio. La bona organizado, la atento al niaj gastoj faris ilian restadon agrabla kaj amuza. Ili havis eblecon viziti diversajn historiajn lokojn ligitajn kun la batalo de nia popolo, kiel: montosupro „Stoletov“, vilaĝo Ŝipka, urbo St. Zagora, Veliko Târnovo, Kalofer kaj aliaj. Ĉiuj pasigis bone sian ripozon, pri tio parolas la fakto ke ni ricevis multajn dankleterojn. En la letero de la Fervojista Sekcio, rondo ĉe Regiona Direkcio de Ŝtataj Fervojoj en urbo Wroclaw, ni legas:

„Ni, polaj fervojistoj-esperantistoj, plej sincere dankas al vi pri via kara kaj gastama akcepto montrita al ni kaj por la multflanka helpo al nia grupo.

Ni longe memoros la restadon en via belega kaj pitoreska lando. Precipe ni dankas al la esperantista rondo en Pavel-banja, kaj al ĉiuj loĝantoj de tiu ĉarma loko“.

Eugenius Zagorovski, profesoro en urbo Bistrica Klodzka, Pollando:

„Mi ĉiam rememoros pri mia restado en Pavel-banja, por via ĝentila kaj gastama popolo. Mi estas tre kontenta ke en via lando mi trovis novajn kaj bonajn amikojn“.

Stanislav Bartoviĉ, inĝeniero el urbo Piešťany, Ĉeĥoslovakio, skribas:

„Mi neniam forgesos la bulgaran gastamecon kaj vian belegan landon“.

Tiajn dankemajn vortojn ni legas en la leteroj de Anna Ŝlezal el Bistrica, Barbara Janĉek el Wroclaw kaj de aliaj.

Hr. Rastev

POR PLI BELA KAJ LEGINDA REVUO

En Bulgario aperas kvar presitaj Esperanto-revuoj. El ili plej grava kaj necesa por nia movado sendube estas la revuo „Bulgara Esperantisto“. La asocia presorgano estas la plej regula kontaktilo inter la estraro de Bulgara Esperantista Asocio kaj ties membraro. Ĝi ne nur informas pri la esperantistaj eventoj en nia lando kaj en ekster-

lando, sed ankaŭ mobilizas la bulgarajn esperantistojn por plenumado de la asociaj taskoj kaj celoj.

Se oni komparas la kajerojn apes rintajn dum tiu ĉi jaro kun la kajeroj de la revuo aperintaj pli antaŭe, estakonstatebla progreso ne nur en la eksteraj, sed ankaŭ en la enhavo. Malgraŭ tio, ĉiam kiam oni pridiskutas la aso-

cian presorganon, estas direktitaj kritikaj notoj kaj proponoj por plibonigo. Tio montras ke la revuo havas ankoraŭ mankojn kaj la legantoj deziras ricevadi ĉiam pli belan kaj riĉenhavan revuon.

Plibonigojn, forigon de ne plu necesaj rubrikoj kaj enkondukon de novaj rubrikoj oni ĉiam povas fari, sed oni preferas fari tion precipe en la komenco de la jaro. Ĉar baldaŭ la redakcio devas pretigi la materialojn por la januara numero de 1968 ni devas pli detale pridiskuti nian revuon kaj fari proponojn por ĝia plibonigo.

La redakcio devas turni pli grandan atenton al siaj kunlaborantoj. Por la bono de nia revuo tio estas des pli necesa, ĉar ili ne ricevas honorarion por siaj verkitaj kaj publikigitaj materialoj. Tiujn pli ĝeneralajn respondojn, kiuj devas esti sciataj de pli granda nombro da kunlaborantoj la redakcio povas respondi ankaŭ per la paĝoj de la revuo. En ĉiu numero devas esti rubriko „El nia leterkesto“.

Por instigi la kunlaborantojn sendadi pli variajn materialojn por publikigo en la revuo la redakcio devas publikigi en la fino de ĉiu jaro la nomojn de 3-5 plej aktivaj kunlaborantoj. Se estas eble oni donu al ili ankaŭ libro-premiojn.

Ĝojiga fakto estas ke sur la paĝo de la revuo lastatempe aperadas novaj rubrikoj. Ni bezonas aperadi en ĉiu numero de la revuo ankaŭ la rubrikoj „Por la novaj esperantistoj“, „In-

fana paĝo“, „Por nia distro“ k. a. La esperantistoj ŝatas legi anekdotojn kaj rigardi trafajn karikaturon. Ankaŭ ne estas malgranda la nombro de la legantoj kiuj kun plezuro penas solvadi diversspeciajn enigmojn. Inter la solvintoj de la publikigitaj enigmoj la redakcio devas lotumi libro-premiojn.

En la revuo oni aperigu mallongajn rakontojn kaj versaĵojn. Ili ne okupu pli ol du paĝojn en ĉiu numero. La presigo de multaj informoj pri malfermo kaj fermo de Esperanto-kursoj kaj pri okazigo de kunvenoj en la rubriko „Organiza Vivo“ oni devas variigi per publikigo de sciigoj de la asocia estraro per statistikoj de la okazintaj kursoj por civitanoj kaj lernantoj aŭ per materialoj pri nia propagando. Tiujn artikolojn aŭ materialojn la redakcio devas plani kaj serĉi kompetentulojn kiuj verkos ilin.

La revuo ofte malfruas pro diversaj kaŭzoj. Por ke materialoj pri datrevenoj kaj aliaj eventoj estu en la manoj de la legantoj antaŭ ilia okazigo ili devas esti presataj sufiĉe frue. Ekzemple se devas aperi artikolo pri Unua de Majo ĝin oni publikigu en la aprila aŭ eĉ en la marta numero de „Bulgara Esperantisto“.

Ni havas fortojn kaj eblecojn plibonigi la revuon „Bulgara Esperantisto“ por ke ĝi estiĝu unu el la plej belaj kaj legindaj esperantaj presorganoj. Por ke ni efektivigu tion estas necese ke la societoj periode pridiskutu la aperintajn numerojn de „Bulgara Esperantisto“.

N. N.





Esperanto en la turismo

REVUO „LA MIGRANTO“

La Internacia Turista Asocio „La Naturamiko“ estas unu el la ne multaj organizaĵoj, kiuj ne nur aplikas, sed ankaŭ subtenas la disvastigadon de la Internacia Lingvo Esperanto. Ĝia Esperanto-fako ek de la komenco de tiu ĉi jaro eldonadas sian presorganon „La Migranto“ pli ofte — kvarfoje en la jaro. Ankaŭ la paĝoj de ĉiuj numeroj duobliĝis de 16 al 32.

La dua numero kiel ĉiuj ĝis nun aperintaj estas presita sur bonkvalita papero. Ankaŭ en ĝi abundas la kliŝoj — ĉirkaŭ 30. La materialoj kiujn oni presas estas ĝeneralaj pri turismo aŭ specialaj pri utiligado de Esperanto en tiu amasa movado. Jen kelkaj titoloj, kiuj donos al vi imagon pri la enhavo de la revuo: „Tri Vloj en Mauro A Mare“, „La amikoj de l' Suno“, „Printempaj

Kampadistoj?“, „Influo dela alteco sur la Homo“, „Floroj, Semoj kaj Plantidoj“, „Novaĵoj . . . Komunikoj . . . Informoj . . . el la Esperantista Mondo“, k. a.

„La Migranto“ estas unu el la multaj Esperanto-periodaĵoj, kiuj ne estas „neŭtralaj“ rilate la ĉefajn problemojn sur nia planedo. En ĉiu numero estas artikoloj, kiuj klare diras ke la turistoj-esperantistoj, kiuj amas kaj protektas la naturon aktive laboras kaj agas por defendo de la paco kaj kontraŭ la milito. En la dua numero de tiu ĉi jaro tio estas esprimita ne nur en la recenzo de la libro „Patrino kun Fusilo“, sed pli detale kaj senkompromise en la materialo „De Prezidantaj Larmoj ĝis Atombomboj“.

La bulgaraj esperantistoj-turistoj aktive kunlaboras, disponigante al la redakcio diversajn artikolojn, versaĵojn, anekdotojn, bildojn k. a. En la lasta numero oni aperigis la jenajn materialojn senditajn de ni: „Turista Mozaiko el Bulgario“, „Al intensa aplikado de Esperanto en la Turismo“ kaj „Jahurto“.

La dezirantoj aboni la revuon sin turnu al Turista Sekcio „Esperanto“, P. K. 45, Sofio.

N. N.

Je la 9-a de aŭgusto 1967 en Kazanlâk forpasis la modela eksinstruisto kaj unu el la plej malnovaj esperantistoj en la Valo de la Rozoj

DIMITR ANDREEV

Li jam estis 103-jara kaj lin memoras multaj generacioj, kiujn li instruis kaj preparis esti bonaj instruistoj, dissemiĝantaj en la tuta lando kaj esti honestaj civitanoj, sindonaj servi por la progreso kaj antaŭeniro de nia patrolando.

Ofte oni skribis pri li sur la paĝoj de nia gazetaro kaj oni prezentis lin ne nur kiel sindonan socian aktivulon kaj instruiston, sed ankaŭ kiel unu el

la plej malnovaj adeptoj de la Internacia Lingvo en la komenco de XX-a jarcento. En „Nuntempa Bulgario“ aperis speciala artikolo dediĉita al li. Li lernis Esperanton kaj ankaŭ per ĝi klopodis instrui kaj batali por plialtigi la kulturon kaj la klerigon de sia amata popolo. Li instruis milojn da ĝeinstruistoj kiuj en urboj kaj vilaĝoj laboris por la rapida evoluo de la bulgaroj.

Ni estas tre malĝojaj pro lia forpaso, sed samtempe ni estas fieraj ke en nia naskiĝurbo loĝis, vivis, kreis kaj servis al la kulturo kaj Esperanto nia neforgesebla instruisto Dimitr Andreev.

Liaj dankemaj lernantoj.

Iv. Sarajov kaj Iv. Zahariev



PRI ESPERANTO-KURSO EN BULGARA TELEVIDO

Antaŭ nelonge mi adresis peton pri starigo de Esperanto-kurso en la Bulgara Televido. Oni respondis al mi per letero, en kiu estas skribite, ke nun Bulgara Televido ne intencas okazigi televidan Esperanto-kurson, des pli ke krom mi nur kelkaj aliaj personoj petis tian kurson.

De la respondo evidentiĝas, ke se multe da spektantoj de la televidaj programoj esprimos deziron lerni Esperanton per televida kurso la televida redakcio, kiu prizorgas la aranĝadon de

kursoj pri fremdaj lingvoj zorgos, ke oni okazigu ankaŭ tian kurson.

Ni ofte malkontentas ke per la ceteraj ĵurnaloj, per la radio kaj la televidstacio oni malofte diskonigas Esperanto-materialojn, sed estas vero ke ne malofte sendas al ili konvenajn materialojn.

Se vi deziras ke la Esperanto-instruisto aperu en ĉiuj bulgaraj domoj, kie estas televidaparatoj vi sendu leteron en bulgara lingvo al Bâlgarska Televizija, ulica „Todor Strašimirov“ 2, Sofia. Instigu ankaŭ viajn amikojn adresi individuajn aŭ kolektivajn petskribojn pri organizo de pertelevida Esperanto-kurso.

Nik. Nikolov

LA REDAKCIO RESPONDAS

— Lastatempe aŭtoro de publikigita materialo en gazeto „Bulgara Esperantisto“ petis honorarion. Ni ne pagis al li, ĉar al neniu nia kunlaboranto ni pagas honorarion. Nur senpaga liverado kaj publikigo de materialoj en la revuo kaj kolektado de diversaj reklamoj ebligas liveradon de 12 kajeroj jare po 20 paĝoj kontraŭ tiom malalta abonkotizo.

— En sep landoj ni havas perantojn. En la ceteraj landoj ni serĉas perantojn por varbado de abonantoj. Ni preferas havi kiel perantojn Esperanto-Asociojn, societojn aŭ aktivajn esperantistojn.

— De tempo al tempo en la redakcio estas ricevataj preskaŭ nelegeblaj manuskriptoj aŭ tre dense skribitaj. Similaj kontribuaĵoj, malgraŭ nia bedaŭro ne povas esti utiligataj kaj trafas la redakcian paperkorbon.

— Kelkaj abonantoj petis nin sur la unua paĝo de la revuo aperigi fotojn el la esperantista movado. Ni ankaŭ deziras tion, sed ĝis nun neniam oni

sendis konvenan foton kun dimensio 9×9 cm. La esperantistoj fotoamatoroj liveru al ni interesajn fotojn por publikigo sur la unua paĝo.

— Ni petas la esperantistojn, kiuj povas desegni literojn, vinjetojn, karikaturojn kaj krucvortenigmojn per tuĉo kaj deziras kunlabori, sin anonci en la redakcio.

— Se vi laboras en oficejo aŭ uzino kiu reklamas en la gazetaro bonvolu provi kaj preni reklamon por nia revuo. La reklamtarifojn vi povas trovi sur la dua paĝo de nia revuo.

— K-do Nikolaj Miĥajlov, studento el Sofio, interesiĝas en kiuj landoj po kiom da abonantoj ni havas.

— Ni havas abonantojn en jenaj landoj: USSR — 274, Pollando — 11, Ĉeĥoslovakio — 12, Hungario — 18, Rumanio — 12, Jugoslavio — 16, Italio — 10, Francio — 11, Japanio — 7, GDR — 15, Nederlando — 14, Britlando — 11, Svedio — 9, Belgio — 9, Aŭstrio — 7 k. m. a.



BULGARIO

Asen P. Sokoľov (20-jara fraŭlo), 7 pl., 7 bl., II et., D. K., urbo Rudozem, distrikto de Smoljan — kun geesperantistoj el la tuta mondo. Certa respondo.

HUNGARIO

Somogyi Adolf (26-jara instruisto), Oroszlány, Aprilis 4. u. 10 — kun bulgaraj gejunuloj.

ĈEĤOSLOVAKIO

Hana Beranová, Sezemice 57. p. Rtyně n/Bilinow, okres Telpice v — Cechách — deziras korespondi kun la tuta mondo.



Maciej Rosenthal (knabo), ul. 24 Stycznia 16 m 2 — deziras korespondi kun ĉ. 1.
Jacek Rosenthal (knabo) ul. 24 Stycznia 16 m 2 — deziras korespondi kun ĉ. 1.
Alojaj Raczkowski (knabo), ul. Srednia 45 m 2 — deziras korespondi kun ĉ. 1.
Krzystow Raczkowski (knabo) ul. Srednia 45 m 2, dez. korespondi kun ĉ. 1.
Adam Kaczmarek (knabo), ul. Belzy 110/26/9 — deziras korespondi kun ĉ. 1.
Grzegorz Kaczmarek (knabo), ul. Wl. Belzy 110/2/3 — deziras korespondi kun ĉ. 1.
Maria Raczkowska (knabino), ul. Srednia 45 m. 2 — deziras korespondi kun ĉ. 1.
Krzystow Miorkiewicz, ul. Awierkowa 4 m 7 — deziras korespondi kun ĉ. 1.
Miroslaw Miorkiewicz, ul. Swierkowa 4 m 7 — deziras kor. kun ĉ. 1.

Aleksandr Angelov, vilaĝo Sovoljano, regiono de Kjustendil, aŭ str. General Parensov 10-Sofio, deziras ricevi diversajn katalogojn, revuojn, broŝurojn, albumojn, librojn pri ĉiuj branĉoj de ĝardenkulturado kontraŭ kompenso, laŭ deziro aŭ anticipa interkonsento.

LA TAGOJ DE LA SEMAJNO (anekdoto)

En vilaĝa lernejo unu el la knaboj ne povis memorfiksi la nomojn de la semajnotagoj. Eksciinte, ke la knabo ĉiutage paŝtas gregon el sep ŝafoj, la instruisto konsilis al la knabo nomi siajn ŝafojn: Lundo, Mardo, Merkredo, Ĵaŭdo Vendredo, Sabato kaj Dimanĉo. Ĉiun vesperon, reveninte en la ŝafejon, la knabeto vokis aparte ĉiun ŝafon, komencante de Lundo kaj finante per Dimanĉo. En la daŭro de kelkaj tagoj la knabo jam lernis parkere la semajnotagojn.

Foje en la lernejon venis inspektoro.

La instruisto komencis ekzameni la lernantojn. Li demandis la ŝafisteton:

— Nu, nomu la tagojn de la semajno!

La infano tuj respondis, ne hezitante:

— Lundo, Mardo, Ĵaŭdo, Vendredo...

La instruisto interrompis lin:

— Ripetu ankoraŭfoje, vi eraris.

La infano rekomencas:

— Lundo, Mardo, Ĵaŭdo...

— Vi forĝesis la Merkredon — diris al li la instruisto.

— Ne, kamarado instruisto — respondis la infano — la lupo jam formangis la Merkredon...

GIGANTA SUNFANDEJO EN PIRENEOJ

En Odeillo en la Francaj Pireneoj, ĉ. 1500 metrojn super la marnivelo, finiĝis lastatempe la konstruo de giganta sunfandejo. Pli ol 60 speguloj de po 44 kv. metroj direktas la suna diojn al unu senmova spegulo de 2450 kv. metroj, fokusita al la forno mem. La fandejo kapablas varmigi po 2-3 tunoj ĝis 3500° C, pli ol duoble pli alte, ol la fandopunkto de fero (Laŭ Unesco Features kaj Informa Servo de UEA).

Redakta komitato: Kiril DRAĴEV, Dimitr ĴDRAKOV, Emil KEREMIDĈIEV, Atanas LAKOV
Ivan SA RAFOV (cefredaktoro), Simeon D. SIMEONOV, Simeon M. SIMEONOV
Adreso de la redakcio: Sofio, poŝtkesto 66 Tel. 83-26-82

ENHAVO

	Paĝo
Ĉefartikolo. La influo de la Granda Oktobra Socialisma Revolucio (N. Aleksiev)	1
K. Kolev. Maristo de la kirassipo „Potemkin“	3
Ĥr. Smirnenski. El la poemo „Moskvo“	7
Ĥrima. Patrino atendas	7
Geo Milev. El la poemo „Septembro“	7
Ĥr. Gorov Verdaj standardoj flirtas en Rotterdam	8

ORGANIZA VIVO

At. Krumov, N. Bojaĝiev, Ĵ. Zaprjanov, Ĥr. Rastev, N. N.	11
N. N. Revuo „La Migranto“	15
Nik. Nikolov. Pri Esperanto-kurso en Bulgara Televido	16

Kovrilpaĝo: La hungaraj geesperantistoj kaj iliaj gastigantoj en la centro de Dimitrovgrad antaŭ la Domo de la Urba Popola Konsilantaro. Dank' al la influo de la Granda Oktobra Socialisma Revolucio tiuj reciprokaj gastadoj inter junpioniroj fariĝis tre dezirataj kaj realigeblaj.

Abonkotizo: jara — 1,40 levoj, duonjara — 0,70 lv. Por eksterlando — 2 lv, 2 rubloj, 2 dolaroj aŭ egalvaloro; por Albanio, ĈSSR, Hungario, Jugoslavio, Pollando kaj Rumanio — 1,60 lv. Por Italio — 1000 liroj. Aparta numero — 0,14 lv. Reklamtarifo: 0,15 levoj por cm²; sur tuta kovrilpaĝo — 80 lv.; korespondanoncoj: 5 stotinkoj por ĉiu vorto; eksterlandaj adresoj — publikigataj senpage.

ENLANDAJ PERANTOJ DE „BULGARA ESPERANTISTO“

ALBANIO: Ing. Cefo Fico, R. Kongresi Permetit 7—II/10, Tirane.

ITALIO: Julia Franceschi, str. Francesco Nullo 2, Padova.

KOREO: Korea Esp. Asocio, Pjeng' jang P. O. kesto 16.

NEDERLANDO: Ru Bossong, Floraplein 2 Eindhoven.

RUMANIO: Mihail Popescu, Cal. 13 Septembrie 65, București 5.

SOVET-UNIO: Ivan Palkin, Mitnaja ul. 52/54 kv. 19, Moskva, B—162.

SVEDIO: Karl Kvist, Deje, Box 109.